# ATEISMO

## Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo




Dimanĉa Asembleo por senreligiuloj, Conway Hall, Londono

(Fonto: Sunday Assembly)

**N-ro 29** **http://ateisto.org** **Novembro 2019**

# Vorto de la Redaktoro

Lastatempe venis la novaĵo, ke en Pakistano, 39-jaraĝa universitata lekciisto, Junaid Hafeez, estis mortkondamnita pro blasfemo. Li estis arestita jam en 2013 kaj sidas ekde tiam en malliberejo. Foto montras la advokatojn de la prokurora flanko festantaj kun dolĉaĵoj post kiam la juĝo estis anoncita. La unua advokato de Hafeez estis mortpafita en 2014, do en Pakistano eĉ reprezenti blasfem-akuziton estas ege danĝere. Kio estis la supozata krimo de Hafeez? Afiŝado de malestimaj komentoj pri Mahometo en sociaj komunikiloj.

Kial la potenculoj kaj religiaj instancoj en lando kiel Pakistano timas kritikojn pri la islama religio kaj ĝia profeto? Kial ili timas debaton pri religio? Kial ili ne kapablas defendi sian religion per argumentado? Ĉu ĝi estas blinda ideologio bazita nur sur perforto? Mahometo faris diversajn agojn dum sia vivo - kial oni ne rajtas kritiki iujn el ili aŭ pridubi iujn rakontojn pri li? Kial oni ne povas kritiki iun ajn religion kaj ĝiajn ĉefrolantojn same kiel iun ajn alian ideon aŭ ideologion?

Krome, anoj de religio, kiuj ne toleras kritikadon, eĉ mokadon, kaj ne toleras alireligianojn kaj senreligiulojn, montras malrespekton por la inteligenteco, pensokapablo kaj racio de homoj, supozeble donitaj de la propra dio de tiuj religianoj. Tiuj ecoj kondukas al diverseco de kredoj, al kritikado, al pridubado. Ili devus demandi sin kial tiom da milionoj kredas je aliaj religioj aŭ tute ne kredas. Eĉ se Islamo estas la "vera religio" kaj Mahometo la vera mesaĝisto de Dio, tiu vereco ne estas tuŝita de la "blasfemo" de iu individuo. Homoj ja eraras, nur Dio perfektas, ĉu ne?

Feliĉe la koncepto de blasfemo ne ekzistas inter ni ateistoj, kiuj ja havas diversajn opiniojn kaj povas libere diskuti kaj kritiki. Respegulante la ĉeftemon de la ATEO-kunveno dum la UK en Lahtio, Finnlando, tiu ĉi numero havas kelkajn artikolojn pri kunvenado, festado kaj solenado de ateistoj paralelaj al tiuj bazitaj sur religioj. Estas interesa demando ĝis kiu grado ateistoj "imitu" religiecajn festojn kaj ceremoniojn. Eble la koncepto de "maldiservo" estas la plej disputiga - ĉu ateistoj bezonas ian ekvivalenton de diservoj? Artikolo ĉi-numera prezentas interesan ekzemplon de laika diservo, dum alia, tre kortuŝa, priskribas personan sperton pri sekulara funebrado. Mi invitas vin legi

pri tiu ĉi temo, kaj ankaŭ pri diversaj aliaj aferoj, interesaj kaj gravaj por ni ateistoj.

Fine, mi ŝatus instigi vin, la legantojn, kontribui pli abunde al nia bulteno, tiel ke estos pli da kontribuintoj el pli da landoj. La tasko de la redakcio ne estas mem verki aŭ traduki tekstojn, tamen en realeco tion ni sufiĉe multe faras ĉiunumere! Vi povas tion ŝanĝi! Jen kion vi povas fari: kundividu viajn pensojn aŭ reagojn (inkluzive pri io, kion vi legis ĉi tie), kundividu novaĵojn el via lando aŭ el la mondo ĝenerale. Krome, vi estas bonvena traduki interesan artikolon/informon en Esperanton - el retejo, gazeto, libro aŭ alia fonto. Mi pardonpetas pro la malfruo diverskiale de tiu ĉi numero. Sed se la redakcio ne estus devigata mem verki grandan parton de la revuo, ĝi povus aperi pli akurate! Feliĉan kaj fruktodonan novan jardekon al vi ĉiuj!

## Festado por ateistoj: enkonduko al la temo

Dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto la religiuloj havas ceremoniojn, sed ne la ateistoj. Tial membero de ATEO sugestis organizi, okaze de la venonta ATEO-kunveno, ateisman ceremonion aŭ “maldiservon“ laŭ la modelo de diservo. Tiu demando inspiris la temon “festado por ateistoj“. Jen enkonduko al tiu temo prezentita dum la kunveno de ATEO en Lahtio (dum la ĉi-jara UK).

**Du vidpunktoj**

Inter la ateistoj troviĝas du ĉefaj vidpunktoj. Estas tiuj, kiuj kiel ateistoj rifuzas ĉion, kio povus simili al religio, ekzemple ateisman ceremonion.

La dua vidpunkto estas tiu proponita de la brita filozofo Alain De Botton en sia libro *Religio por ateistoj*. Aperis artikolo pri tiu libro en nia revuo, n-ro 24 de Majo 2017, verkita de Anna Lowenstein. De Botton argumentas: oni ne forĵetu la bonajn flankojn de religio. Kompreneble ateistoj ne kredas je supernatura estaĵo, tamen la homoj havas psikajn kaj emociajn bezonojn, kiujn la religioj kontentigas per diver-

saj praktikoj. Ateistoj povus prunti ideojn el la religioj – kompreneble ne la supernaturajn kredojn – por kontentigi tiujn bezonojn.

En ĉiuj religioj ekde la pratempo, estas kvar okazoj, kiujn oni aparte festas aŭ solenas. Tiuj estas nasko kaj naskiĝo, plenaĝiĝo, geedziĝo, kaj morto kaj funebrado. Pri ĉiu el tiuj kvar eblus prezenti apartan prelegon, sed jen mallonga resumo. Kvankam ateistoj ne plu kredas je la religiaj aspektoj de tiuj gravaj momentoj de la vivo, pli kaj pli el ili sentas la bezonon soleni ilin.

**Ekzemploj de ceremonioj**

Por naskiĝo kelkaj ateistoj organizas nom-ceremonion, kiam oni donas nomon al la infano. En Francio eblas peti de la urbestro civilan aŭ respublikan bapton, kiu estas maniero celebri sen religiaj referencoj naskiĝon de infano.

Fine de la adolesko, estas festo por la plenaĝiĝo, kiam oni teorie komencas sian vivon de plenkreska civitano. En la ATEO-kunveno dum la rejkjavika UK en 2013 ni aŭdis tre interesan prezenton pri la laikaj konfirmacioj en Islando. Laŭ la modelo de la religiaj konfirmacioj, la infanoj sekvas kurson dum kiu ili pripensas tiujn demandojn, kiuj aparte zorgigas adoleskulojn, ekz.: etiko, homaj rajtoj, rilatoj inter la seksoj, misuzo de drogoj, protektado de la vivmedio, kaj respondeco pri la propraj opinioj kaj konduto. Je la fino de la kurso okazas formala diploma ceremonio. La salono estas ornamita de floroj kaj flagoj, oni ludas marŝmuzikon dum la gejunuloj paradas internen. Estas muziko, paroladoj kaj poezio. Eminenta islandano faras paroladon pri grava temo en kiu estas esprimata espero, ke la gejunuloj fariĝos respondecaj, toleremaj, honestaj homoj.

Rilate al la geedziĝo, multaj homoj tamen volas geedziĝi en preĝejo, ne pro religia kredo, sed ĉar ili deziras belan ceremonion. Tamen pli kaj pli la homoj mem organizas ceremonion sen religia kunligo, sed kiu pli bone respegulas la kredojn aŭ la ideojn de la koncernaj paroj.

Kiam iu mortas, la parencoj kaj geamikoj deziras formale adiaŭi tiun homon. En Poznano (Pollando) dum Esperanto-renkontiĝo (Arkones), oni organizis kunvenon memore al du gravaj esperantistoj, kiuj mortis lastatempe:

Detlev Blanke kaj Michel Duc-Goninaz. Pluraj homoj rakontis kion ili travivis kun tiuj homoj. La parolantoj estis interalie Katalin Kovats, Illona Koutny, Probal Dasgupta kaj Ulrich Lins. La rezulto estis tre kortuŝa ceremonio, evidente sen religia enhavo. Kompreneble oni ne preĝis, sed la rezulto estis tre emociiga.

**Funkcioj de ceremonioj**

Tiaj ceremonioj havas du funkciojn. Unue, ili helpas la homojn alkutimiĝi al nova fazo de la vivo kaj akcepti ĝin. Ekzemple, la konfirmacio valoras ne nur por la infano mem, sed ankaŭ por prepari la gepatrojn por nova periodo de la vivo kiam iliaj infanoj fariĝis plenkreskuloj ne plu dependaj de ili. Funebrado havas la funkcion helpi la postrestantojn akcepti la novan situacion, kaj donas konsolojn, kiuj helpas ilin ne nur funebri sed ankaŭ memori pri la bonaj flankoj de la travivaĵoj kun la mortinto.

Due, tiaj festoj, ceremonioj aŭ okazaĵoj donas al la partoprenantoj senton aparteni al komunumo kaj la eblecon ĉeesti belajn kaj ĝojajn eventojn aŭ serenajn kaj konsoligajn momentojn. Tiuj spertoj povas ankaŭ helpi provizi la ĉeestantojn per novaj kialoj aŭ celoj por decidi plene vivi, kaj reveni aŭ firmigi sin sur la vojo de feliĉo kaj humanismo.

**Bernard Behra (Francio)**

## Dimanĉaj asembleoj

Hodiaŭ mi partoprenis en dimanĉa asembleo. Ne, ne temis pri preĝeja asembleo, kvankam la kunveno havis sufiĉe evangelian etoson. Estus pli ĝuste diri, ke ĝi estis diservo sen dio.

Kial mi decidis ĉeesti sendian diservon? Mi estis inspirita de la kasisto de ATEO, Dieter Rooke, kiu mem partoprenas tiajn kunvenojn en Svislando, kaj deziris organizi ion similan dum nia kunveno de ATEO en Lahtio. La temo de nia kunveno laŭ instigo de Dieter, estis "Festado por ateistoj", kaj ni diskutis, kiel ateistoj festas aŭ solenas la gravan okazaĵojn de la vivo, t.e. nasko, plenaĝiĝo, geedziĝo kaj funebrado.

Al tiuj pli gravaj eventoj, ni devus aldoni la regulan ĉiusemajnan

renkontiĝon. En sia tre interesa libro *Religion for Atheists* (Religio por ateistoj) la brita filozofo Alain de Botton diskutas, kiel religioj donas al siaj sekvantoj sencon de

de la vivo. Mia recenzo pri la libro de Alain de Botton aperis en la 24a numero de nia revuo de majo 2017, p. 21-22.



Entuziasmaj partoprenantoj en Dimanĉa Asembleo, Londono

(Fonto: Sunday Assembly)

komunumo. Tio fariĝas aparte necesa nuntempe, kiam la homoj ofte vivas izolite kaj anonime en grandaj urboj. Li eĉ proponas humure, kaj eble ne tro serioze, ke en ateisma socio necesus anstataŭigi la preĝejon per restoracio, en kiu la ĉeestantoj renkontiĝus kiel egaluloj kaj dum la manĝo diskutus la pli profundajn temojn

Iom similan ideon havis la brita komikisto Sanderson Jones antaŭ 16 jaroj, kiam li iris al koncerto de kristnaskaj himnoj. Li tiom ĝuis la kunkantadon, ke li forte deziris fari ion similan, sed sen la religia aspekto. Nur poste en 2013 li kun alia komikisto Pippa Evans finfine provis fari tion. Ili organizis dimanĉan kunvenon laŭ la modelo

de la tradicia diservo, tamen kun pli moderna etoso, kaj kompreneble sen religia enhavo. Tiu modelo estis tiel sukcesa, ke ekestis tuta movado. En la plej sukcesa periodo estis ĉirkaŭ 90 asocioj precipe en anglalingvaj landoj (Britujo, Usono, Nov-Zelando, Aŭstralio, Kanado), sed ankaŭ en Nederlando, Germanujo kaj Hungarujo.

Kio okazas dum dimanĉa asembleo? Ĉi-matene mi kaj Renato iris al kunveno en Londono. Ĝi okazis en Conway Hall, kies nomo estis tradicie ligita kun la liberpensa movado, la humanisma movado, kaj kun progresemaj agadoj ĝenerale. La kunveno komenciĝas per du aŭ tri popularaj kantoj, gvidataj de muzikgrupo kaj malgranda ĥoro sur la podio. La vortoj estis projekciitaj sur ekrano por ke ĉiuj partoprenu. La spektantaro kantis starante – la etoso estis tre vigla, entuziasma, kaj ekstreme laŭta.

Sekvis mallonga parolado de membro de la asocio, kiu invitis la homojn volontuli por ĝiaj diversaj agadoj, ekzemple bonvenigi la ĉeestantojn, fari la teon, vendi kukojn, sed ankaŭ partopreni en iuj bonfaraj agadoj, ekzemple komuna volontulado por difinitaj agadoj ĉe eksteraj homhelpaj asocioj.

La ĉefa parolanto de la mateno estis profesia aŭtoro kaj esploristo James Wallman, kiu prezentis sian libron *Time and how to spend it: the 7 rules for richer, happier days* (La tempo, kaj kiel utiligi ĝin: la 7 reguloj por pli riĉaj, pli feliĉaj tagoj). La titolo mem donas impreson pri la enhavo kaj la stilo de la parolado, kiu estis efektive interesa kaj pensiga.

Poste estis pli da kantoj kaj eĉ invito al surloka dancado (t.e. starante en sia loko), kaj la kunveno finiĝis per poemo de membro de la kongregacio. Laŭ la modelo de preĝejo, oni pasigis grandajn sitelojn kun invito doni sian kontribuon: de nulo por homoj sen mono ĝis £5, £10 aŭ eĉ £20 por la plej bonfartaj ĉeestantoj. Tio estas granda sumo, sed necesas memori, ke lui Conway Hall dum 2-3 horoj estas ne malmultekosta afero.

Sed tio estis nur la formala parto. Eĉ pli grava estas la neformala parto, kiu sekvas: teo kun hejmfaritaj kuketoj (aĉetado de la kukoj certe kontribuas al la financoj), kaj poste eventuale komuna tagmanĝo ĉe loka trinkejo.

Ĉeestis laŭ nia takso ĉirkaŭ 120 homoj. Tio estas duoblo de la membraro de ATEO, kaj multe pli da homoj ol tiuj, kiuj kutime partoprenas en la kunvenoj de Londona Esperanto-Klubo. Venis al mi la penso, ke se ni dum niaj kunvenoj aŭdigus same laŭtan muzikon kaj invitus la homojn kunkanti kaj kundanci, ĉu venus pli da homoj kaj pli junaj homoj al niaj Esperanto-kunvenoj?

Kaj tamen, la dimanĉaj asembleoj ŝajne jam ĝuis sian plej gloran momenton. En 2016 laŭ artikolo en WikiTribune ekzistis 69 asocioj kun proksimume 5000 ĉeestantoj entute, sed nun laŭ la retejo de la asocio mem troviĝas 45 asocioj tra la mondo. La artikolo ĉe WikiTribune sugestas, ke eble la falanta nombro de partoprenantoj spegulas la falantan nombron ankaŭ en preĝejoj. Se por iuj partoprenantoj la dimanĉaj asembleoj anstataŭas la diservon, estas ironia fakto, ke la nombroj malsuprenglitas kune.

Laŭ tiu artikolo, 87-88% de la partoprenantoj deklaras, ke ili sentas sin pli feliĉaj post la dimanĉa asembleo, ke ili sentas sin membro de komunumo, kaj ke per la asocio ili trovis 3-4 novajn geamikojn. Vidante la ĝeneralan entuziasmon de la partoprenantoj, tion mi facile povas kredi.

Kaj ĉu mi mem volus reiri al la dimanĉa asembleo? Fakte ne. Kiel esperantisto mi jam havas tre fortan senton esti membro de komunumo, mi havas amasegon da kontaktoj tra la mondo, kaj pli da agadoj ol mi havas tempon por plenumi. Do mi ne sentas la bezonon aldoni al ili kantadon kaj inspiran paroladon en ĉiu dua dimanĉo.

**Anna Lowenstein (Britio)**

Fontoj: *https://www.sundayassembly.com/, https://en.wikipedia.org/wiki/Sunday_Assembly, https://www.wikitribune.com/wt/news/article/79948/.*

## “Maldiservo” – ĉu taŭga ideo por liberpensuloj?

Mi estas kontenta finfine membriĝi en ATEO, en kiu troviĝas multaj liberpensaj kaj interesaj homoj. Tamen, kiam oni diskutis pri “maldiservo“ dum la ATEO-kunsido en Lahtio, mi estis iom maltrankvila kaj

disreviĝis pro la netaŭgeco de tiu koncepto por liberpensuloj. Kial liberpensuloj kiel ni okupiĝas pri servo al dio kvankam ni celas la malon? Jam la vorto montras, laŭ mi, ke niaj pensoj nur iras ĉirkaŭ ekzistantaj kutimoj kaj ceremonioj, kiujn mi ne plu ŝatas. Nia pensado devus salti libere pli supren ol kontraŭante jam ekzistantajn ceremoniojn. Homa energio estas limigita, do ni uzu ĝin nur por salti (liberiĝi), ne rezisti aŭ kontraŭi.

**Song Jeong-ok (Koreio)**

## Laikaj festoj iniciatitaj de Rabindranath Tagore


Inter la laikaj festoj en la pejzaĝo de Bengallando (en la orienta Barato) plej gravas tiuj iniciatitaj en la eduka komunumo en Santiniketan kaj ĝia ĝemela urbeto Sriniketan.

Rabindranath Tagore en 1901 elektis la lokon Santiniketan – kie lia patro jam kelkajn jardekojn pli frue konstruis domon kaj ofte restadis en soleco por komunii kun la kampara pejzaĝo – por starigi tiacelan lernejon. Li konstruis ĉirkaŭ ĝi kulturan komunumon, kiu strebu al vivstilo harmonia kun la ritmoj de la naturo sed fidela al la libera individua florado de la homoj kaj malferma al epifaniaj inspiriĝoj.

En 1921 li starigis sur tiu bazo universitaton kun internacia instruistaro kaj tutlanda studentaro, Visvabharati, kaj en apuda vilaĝo la ĝemelan komunumon Sriniketan, cele al kampara evoluigo kaj eduko. Santiniketan kaj Sriniketan celebras festojn, kiuj markas la unikan etoson de la kulturaj komunumoj kaj allogas vizitantojn el la tuta gubernio Bengallando, foje ankaŭ alilokanojn. Ĉiujn tiujn festojn ordigas la bengala kalendaro; ni ĉi tie elturniĝas per proksimumoj laŭ la gregoria.

Iuj el la festoj en tiuj komunumoj eĥas la sezonojn. La martomezan printempan feston plej amase partoprenas ankaŭ eksteraj vizitantoj. La unutagan pluvsezonan kaj septagan aŭtunan festojn en julio/aŭgusto kaj septembro/oktobro respektive celebras la komunumanoj mem. La pli ol mil kantoj komponitaj de Rabindranath Tagore estas grava disponaĵo

de la barata kulturo, sed kompreneble la komunumanoj sentas unikan posedantecon pri ili kaj kantas taŭgajn kantojn el lia repertuaro dum ĉiuj siaj festoj. terplugan feston oni okazigas en Sriniketan, la ĝemela komunumo dediĉita al la porkamparana iniciato. Same en Sriniketan oni aranĝas septembromezan feston



Rabindranath Tagore en Santiniketan, Bengalio
(Fonto: thebetterindia.com)

Krome, dum la aŭtuna festo, ili ĉiutage surscenigas unu el liaj diverstemaj teatraĵoj.

La apartaj fortostreĉoj de la kampara elanigo reliefas en arboplanta kaj terpluga festoj en du sinsekvaj tagoj aŭgustaj. Okaze de la arboplantado oni elvokas la kvin elementojn tero, akvo, fajro, aero kaj spaco en festeroj en kvin apartaj lokoj – memore al la forpaso de Tagore je tiu dato. La pri manlaboraĵoj.

La diplomdisdona kunveno de Visvabharati – en prezento artisma kaj konscia pri la riĉa historio de la pejzaĝo – estas unu grava konsistero en la festo decembra. Sed tiun feston markas ĉefe la plurtaga decembra foiro, partoprenata ne nur de kamparaj komercistoj el la ĉirkaŭa regiono sed ankaŭ de la urba libroindustrio

kaj kantistoj. Fine de la decembra foiro la universitata rektoro markas la 25an de decembro, senrite prelegante pri Jesuo, al malgranda aŭskultantaro, apud la domo kie la religiema patro de Tagore iam meditis, en privata spirita etoso ekster la hinduaj kaj kristanaj kadroj.

Ni krome ne forgesu la tritagan prelegaron en majo, memore al la naskiĝo de Rabindranath Tagore, nek la elanfoiron de la lernejanoj en oktobro – la infanoj vendas varojn en foiraj budoj kaj aspiras konkurenci kun la plenkreskulaj festoj, kiuj interpunkcias la tutan jaron.

Iuj el la festoj celtabuligas religie markitajn punktojn en la kalendaro por refarbi tiujn tagojn laike kaj redifine. La fakto, ke tiu entrepreno vigle funkcias jam okdek jarojn post la forpaso de la fondinto de la komunumo, montras profundan enradikiĝon en la socio.

**Probal Dasgupta (Barato / Hinda Unio)**



# Ni ĵetu la Kriston el Kristnasko!

En anglalingvaj landoj dum ĉi tiu periodo oni foje vidas afiŝojn kun la vortoj "Jesuo estas la kialo de ĉi tiu sezono". Tio sonas pli bone en la angla, ĉar ĝi rimas: "Jesus is the reason for the season". Tio estas memorigo, ke Kristnasko ne estas okazo nur por festado, grandaj manĝoj kaj interŝanĝado de donacoj, sed ĉefe religia okazo, kiam oni solenas la naskon de Jesuo.

Kiel ateisto, mi volas proponi alternativan sloganon kun la vortoj "Ni ĵetu la Kriston el Kristnasko!" Ankaŭ mi ŝatas jarfine festi kaj ĝui specialan manĝon kun apartaj frandaĵoj, kaj kiam miaj infanoj estis malgrandaj ni ja havis kristnaskan arbon kaj donis al ili donacojn. Sed tio ne signifas, ke tiu festo havas por mi iun ajn religian karakteron.

La homoj ja havas bezonon de tempo al tempo senstreĉiĝi, precipe dum la plej malvarma kaj malluma (almenaŭ en la norda duonsfero) periodo de la jaro. Kvankam mi estas ateisto, ankaŭ mi plezure atendas tiun festan periodon kaj deziras partopreni en ĝi. Kaj ne nur mi. Ankaŭ en Japanujo, kie la plejmulto da homoj ne estas kristanoj, oni kaptas la okazon por interŝanĝi kartojn kaj donacojn, manĝi specialajn manĝojn, kaj ĝenerale ĝui la feston sen interesiĝi pri ĝia eventuala religia signifo.

Estas normala afero transpreni la festojn de pli frua epoko kaj adapti ilin al la propraj bezonoj. Ni memoru, ke ankaŭ la kristanoj faris tion. Parto de la kristnaskaj kutimoj baziĝas sur la romana Saturna festo, kiu okazis de la 17a ĝis la 23a de decembro, honore al la dio Saturno. (Fakte ĝi komence daŭris nur unu tagon, sed iom post iom longiĝis la festa periodo ĝis ĝi daŭris plenan semajnon.) Tiu festo havis multajn el la trajtoj, kiujn ni nuntempe kunligas kun Kristnasko. Ĝi estis konsiderata familia okazo, sed la roma familio inkluzivis la sklavojn, kiuj ĝuis nekutiman liberecon kaj partoprenis en bankedo. Oni interŝanĝis donacojn, drinkis, vetludis, kaj ĝenerale amuziĝis. Aristokrataj romanoj iom superece plendetis pri la okazo, same kiel la nuntempaj seriozuloj ŝajnigas malŝati la ekscitiĝon ĉirkaŭ Kristnasko. La juna Plinio skribis

al amiko, ke li havas apartan ĉambron en sia vilao, kie li povas trankvile labori malproksime de la bruo kaj festado de siaj familianoj, kaj kie li mem ne ĝenos ilian amuziĝon.




(Fonto: Miguel Cabrera, Facebook)

Oni povas facile imagi, ke la kristanoj en antikva Romo deziris partopreni en la festo same kiel ĉiuj aliaj, kaj ili malfacile klarigus al siaj infanoj, kial nur ili ne ricevas donacojn. Sed ili kompreneble ne volis honori la dion Saturnon, do anstataŭe ili ligis la okazon al sia propra dio kaj al rakonto pri lia mirakla naskiĝo.

En la sama maniero, kristanoj en nord-Eŭropo transprenis tradician ĝermanan feston, Julon. Dum tiu periodo oni portis internen kaj bruligis grandegan arbotrunkon, kiu varmigis kaj lumigis la domon dum multaj tagoj. Oni oferis bestojn en la temploj, kaj poste manĝis ilian viandon, oni tostis kaj kantis. Sendube la nuna kutimo porti internen arbon kaj ornami ĝin datas de tiu pli frua festivalo. Variaĵoj de la vorto Julo ankoraŭ signifas "Kristnasko" en pluraj skandinavaj lingvoj.

Same kiel la kristanoj transprenis tiujn pli fruajn ceremoniojn, la Saturnan Feston kaj Julon, ni ateistoj ne hontu transpreni la kristanan feston kaj transformi

ĝin laŭ niaj bezonoj. Ni ornamu la arbon, ni ĝuu la specialajn manĝaĵojn kaj kantojn, ni interŝanĝu kartojn kaj donacojn. Same kiel ni eventuale rakontas al niaj infanoj pri la afabla maljunulo, kiu venas malsupren laŭ la kamentubo por lasi al ili ludilojn, eble ni iam povos eĉ rakonti al ili la tradician legendon pri la bebo, la stalo, la stelo, la ŝafistoj kaj la tri saĝuloj.

En Italujo estas kutimo krei en sia hejmo ĉarman sceneton kun malgrandaj pupoj kaj bestetoj aranĝitaj en miniatura stalo. Kiam miaj infanoj estis junaj, mi pretis admiri tiajn scenetojn en publikaj lokoj aŭ en la domoj de geamikoj, sed mi konfesas, ke la tuta afero estis por mi, kiel judo, tro senkaŝe kristana por ke mi kuraĝigu miajn proprajn infanojn fari tion. Mi ankaŭ ne rakontis al ili la kristnaskan rakonton; bonŝance tio ne necesis, ĉar ili abunde aŭdis ĝin aliloke.

Dum restas homoj en la mondo, por kiuj tiu rakonto ankoraŭ havas religian signifon, laŭ mia propra sento estas tro frue por mem prezenti ĝin al niaj infanoj. Sed eble iam en la estonteco, ni ateistoj povos fari eĉ tion.

**Anna Lowenstein (Britio)**

## Adiaŭi karulon: persona sperto de laika funebrado

Dek jarojn post morto de karulo, oni ankoraŭ bezonas partopreni en funebrado. Unu mirinda sekvo de laikeco, kompense al la fakto, ke oni devas pli labori por mem krei ritojn, estas ĝuste ke ni mem kreas. Do ni sentas nin liberaj krei tion, kion ni vere bezonas.

Antaŭ nun pli ol dek jaroj, mi travivis veran premsonĝon: mia 23-jaraĝa filo estis frapita de buso kaj mortis. Tia ŝoko estas ja nepriskribebla, sed lia patro kaj mi, helpe de amikaro, sukcesis pretigi nereligian ceremonion, ene de kelkaj tagoj.

Tute hazarde kelkajn semajnojn antaŭ sia forpaso, mia filo parolis pri la morto kun siaj amikoj. Li diris tiam, ke li ŝatus, ke homoj

plantu arbon memore al li post lia morto. Tion faris multaj inter niaj amikoj kaj familianoj, kaj estas vere bele vidi tiujn diversspecajn arbojn kreski, jaron post jaro, en diversaj lokoj.

Dum tiu sama babilado, li ankaŭ petis, ke ni disĵetu liajn cindrojn en la diversajn marojn de la mondo. Do ni, lia frato, lia patro kaj mi, vojaĝis dum la postaj jaroj, portante en nia dorsosako ujeton, kiu enhavis iom da liaj cindroj (kaj enorman kvanton da emocio, kompreneble). Ĉiufoje, kiam ni verŝis tiun grizan polvon en iun oceanon aŭ riveregon, estis kiel alia, privata funebra ceremonio…

Post 10 jaroj, kontaktis nin, gepatrojn, amikaro de nia filo (tiuj mem kun kiuj li parolis pri la morto), dirante: "Estos baldaŭ la 10-jara datreveno. Ni volas okazigi feston honore al nia forpasinta amiko. Ĉu vi ŝatus organizi tion kun ni?" Tio vere kortuŝis nin, ĉar kompreneble ankaŭ ni sentis profunde la alvenon de tiu funebra dato kaj ne sciis, kion fari pri tio.

Estis okazo por pripensi, por taksi evoluon de nia funebrado kaj de niaj vivoj.Maturiĝo, resaniĝo, doloro, kiu iĝis parto de ni mem, paciĝo… Kion ni faru nun, por "festi"? Ni interkonsentis pri tio, ke la epoko de disĵetado de cindroj devas finiĝi. Kvazaŭ kiel simbolo de nova etapo de nia postfunebra vivo, ni decidis forĵeti kune la tutan restaĵon. Sed kiel? Estos gravega momento por ni ĉiuj…

Venis la datrevena tago. El la 80 personoj kiujn ni invitis, preskaŭ ĉiuj venis. Homoj, interalie pluraj kiuj ne revidis unu la alian de tiom da jaroj, babilis, trinkis, ridis ĝis horo de la ceremonio, kiam ĉiuj tre fervore kuniĝis en granda salono. Tiam ni vere festis la memoron de nia karulo. Ni legis tekstojn pri li, pri niaj personaj funebraj vojoj, pri amo kaj amikeco kaj morto.Ni aŭskultis lian muzikon. Ni ankaŭ muzikumis kaj kantis por li. Kaj fine de tiu omaĝo, ni disdonis 80 etajn lignajn diskojn. Ĉiu lignopeco havis, centre, iom da homa cindro, en truo ŝtopita per abelvakso. Ĉiu persono, ricevinte tiun objekton, tenis en siaj manoj lastan "pecon" de sia karulo.

Nun, kion ni faru?Ni invitis ĉiujn veni kun ni al la apuda rivero, kiu

fluas 150 metrojn for de la domo. Tie, sur la eta ponto, ĉiu en sia koro adiaŭis nian karegan Leon. Kiam oni sentis sin preta, oni simple ĵetis sian disketon en la riveron. Kaj ni kune ploris, kaj ankaŭ ridetis kaj brakumis unu la alian, rigardante la disketojn, kiuj dancis en la printempa akvofluo kaj baldaŭ malaperis.

Ni ĉiuj pensis, antaŭe, ke tio estos korŝira afero. Sed ne. Ne vere. Ĝi estis emociega afero, sed fakte paciga, belega, saniga sperto. Ni ĉiuj ĝojis, ke ni faris tiun simbolan geston, kiu certe liberigis nin, iel.

**Suzanne Roy (Kanado)**

## Ĉu ordo en la universo kondukas al Dio?



Ĉu el glanoj povas kreski teologoj?
(Foto de: Editor77 / Shutterstock)

La konata mezepoka kristana teologo Tomaso de Akvino argumentis, ke naturaj aĵoj agas por atingi celojn; tio estas, ke en similaj cirkonstancoj ili preskaŭ ĉiam agas kaj evoluas en simila maniero, kaj tial estas klare, ke ili atingas tiujn celojn, ne pro blinda hazardo, sed pro projektado. Same kiel sago estas direktita de pafarkisto, ĉiuj naturaj aĵoj estas direktitaj al siaj celoj de estaĵo havanta scion kaj inteligentecon, estaĵo, kiun ni nomas Dio. Laŭ Tomaso, la fakto, ke glanoj kreskas ĝis ili fariĝas kverkoj kaj ke la naturo montras regulecon, estas pruvo de dia gvidado. Ŝajne, sen la helpo de Dio, la naturo degenerus en kaosan senregulecon.

La kerno de tiu ĉi argumento teleologia – kaj ĝia fundamenta eraro – kuŝas en la supozo, ke

ordo implicas konscian projektadon (kie “ordo” rilatas al reguleco en la naturo). Tio estas klare falsa. Estas vere, ke ekzistas ordo en la universo, ke troviĝas reguleco en la naturo, ke aĵoj kondutos same en la samaj cirkonstancoj – sed ne validas dedukti el tio la ekziston de iu supera projektisto. Male, ordo estas simple la manifestiĝo de kaŭzeco, kaj kaŭzeco estas derivaĵo, logika korolario, de la Leĝo de Identeco.

Ekzisti signifas ekzisti kiel io, kaj esti io signifas posedi specifajn, determinitajn trajtojn. Alivorte, ĉiu ekzistanta aĵo havas identecon: ĝi estas kio ĝi estas kaj ne io alia. Diri, ke io havas specifajn trajtojn signifas diri, ke ĝi havas limigitan naturon, kaj tiuj ĉi limoj nepre limigas ĝian gamon de eblaj agoj. La naturo de iu aĵo determinas tion, kion ĝi povas fari en iu specifa aro da cirkonstancoj. Sekve estas eraro konfuzi “ordon” kun “projektadon”. Se troviĝas projektado en la naturo, devus ekzisti projektisto, sed la samo ne veras pri ordo. Ordo ne supozigas ordigiston; ĝi simple estas necesigita de la naturo de la ekzistado mem.

Kia estus la universo, laŭ la imago de teisto, se ĝi ne estus gvidata de supera projektisto? Kia aspektus senorda universo? Kion farus glano? Kreski en ŝtonon, eble, kaj sekve en teologon?! Se glano ja rezultigus ŝtonon, ĝi devus posedi trajtojn radikale malsamaj disde tio, kion ni nun nomas “glano”, kaj en tiu okazo ĝi ĉesus esti “glano” en iu ajn signifoplena senco.

La elekto prezentita de la teisto inter hazardo kaj projektado estas falsa alternativo. Ĉar la ordo en la naturo ne estas rezulto de planado, tio ne signifas, ke ĝi estas sekvo de nura “hazardo”. Parolante metafizike, ne ekzistas “hazardo”. Okazaĵoj ne “simple okazas” senklarige, senkaŭze. Ni parolas pri “hazardo” kiam ni ne konas ĉiujn rilatajn faktorojn, kiel ekzemple ni diras, ke la rezulto de monerĵeto estas afero de hazardo. Sed tio nur signifas ke, kadre de la propra scio, la rezulto de la ĵeto estas nesciata. Tamen, kaŭzaj kondiĉoj funkcias ĉi-rilate, kaj se ni estas provizitaj per la bezonata scio – kiel ekzemple la rapideco, alteco kaj angulo de la ĵeto – oni povus antaŭvidi la rezulton. La koncepto “hazardo” estas epistemologia, ne metafizika.

La vera alternativo, kiu frontas nin en la argumento de projektado, estas inter neceso kaj supernatura kaprico. Laŭ la naturisto, la universo montras ordon ĉar ordo estas unu flanko de ekzisto, la du estas nedisigeblaj. Sed laŭ la teisto, la universo estas esence malstabila kaj kaosa, sed Dio, nekonebla estaĵo, iamaniere ordigas la tutaĵon, uzante nespecifitajn kaj nekoneblajn metodojn. Do, la elekto estas inter racio kaj magio.

Konsiderante ĉi ĉion, konstateblas, ke la argumento teleologia renversas ĉion. Orda universo estas ĝuste tia, en kiu ne estas spaco por supernatura influo; agnoski la ekziston de ordo signifas forigi la bezonon por iu dio. Kiam la franca astronomo Laplace estis demandita de Napoleono, kial li ne mencias Dion en siaj verkoj, Laplace respondis, “Sinjoro, mi ne bezonas tiun hipotezon”. Kaj same neniu alia bezonas ĝin. Se glanoj komencos kreski en teologojn, aŭ se virinoj komencos fariĝi kolonoj de salo, ni povos hipotezi pri supernatura influo. Sed ĝis la momento kiam la naturo fariĝos senespere nekomprenebla kaj neantaŭvidebla, ne necesas rigardi pli malproksimen ol la naturo mem por klarigoj.

*Fragmentoj el la anglalingva libro* Atheism: The Case Against God *de George H. Smith (eldonita en 1974) tradukitaj de la redakcio de* Ateismo.

## Fido kaj dankemo fronte al amasaj malfeliĉaĵoj

La tagon de la tria sinsekva inundego en Venecio ĉi-novembre, post kiam la akvo malaltiĝis, okazis belega sunsubiro. En itala retejo, oni afiŝis ravan filmeton, kiu montris la preĝejon de Santa Maria della Salute (Sankta Maria de la Sano), ĉe la suda fino de la Granda Kanalo, kun sia impona kupolo, siluetita de la sunsubiro. Tiu preĝejo aperas en la pentraĵoj de famaj pentristoj kiel Monet, Turner, Sargent kaj Canaletto. Unu el la simboloj de la urbo, ĝi estis konstruita en la 17a jarcento por esprimi dankon al la Virgulino Maria pro la finiĝo de terura pesto. La epidemio mortigis tri-

onon de la civitanaro de Venecio, 46,000 loĝantojn. Simile okazis en la 16a jarcento: pesto mortigis trionon de la loĝantaro – inkluzive la faman pentriston Ticiano – kaj kiam ĝi finiĝis, oni konstruis kiel dankon la preĝejon de Il Redentore (La Savinto).

Nu, kompreneble, estas afero de fido se oni kredas, ke la Madono aŭ Jezuo iel intervenis por fini teruran plagon. Oni povas plene simpatii kun la venecianoj, kiuj travivis tian neimageblan tragedion, vidinte egajn suferadon kaj morton ĉie ĉirkaŭ si, kaj sentis ege dankemaj al ĉielaj fortoj, ke la pesto finfine ĉesis kaj ili supervivis. Sen la fido kaj la dankemo de la venecianoj, ni ne havus la majestan Salute, nek la fabelan Bazilikon de Sankta Marko, nek la imponan Redentore aŭ multajn aliajn preĝejojn, kiuj ornamas Venecion. En tiu epoko, homoj en Eŭropo estis kredemaj pri la interveno de Dio, Jezuo, Maria kaj aliaj sanktuloj en siaj vivoj. Tial ili preĝis, tial ili konstruis belajn preĝejojn trans la kontinento, kiujn ni nun admiras kiel turistoj.

Kvankam katastrofoj kiel la veneciaj pestoj venigas la demandon kial Dio aŭ alia ĉiela estaĵo permesas, ke ili okazu kaj forprenu tiom da vivoj, aŭ almenaŭ ne pli frue haltigas ilin, eŭropanoj de antaŭaj jarcentoj supozeble akceptis la mondon kiel kombinaĵon de bono kaj malbono, funkciantan laŭ dia volo. Kristanaj teologoj provas ekde antikvaj tempoj trakti la problemon de malbono per t.n. teodiceo por pravigi Dion kaj rebati la argumenton pri kontraŭeco inter ĉiopova, perfekta Dio kaj la ekzisto de malbono. Kiam la Nigra Morto envolvis tutan Eŭropon en la 14a jarcento, la katolika eklezio klarigis, ke ĝi estis dia puno por homa pekado – 60% da venecianoj mortis tiuokaze. Ne estas klare ĉu ankaŭ dum tiuj sekvaj pest-atakoj, la eklezio nomis dian punon la kaŭzo. Sed eĉ en nia jarcento, religiuloj en Azio asertis, ke la granda hindoceana cunamo estis dia puno, kaj same en Usono fundamentistaj pastroj asertis, ke la uragano, kiu dronigis Nov-Orleanon estis puno por homa pekado – kvincent jarojn post la Mezepoko!

Ligita estas la demando kial, konsidere ke en ĉiuj natur-katastrofoj estas postvivintoj, Dio (aŭ alia ĉiela figuro) lasas ĝuste ilin vivi,

kaj ne aliaj. Se temas pri dia puno, kial la puno estas arbitra, hazarda? Dubindas ĉu ĉiuj, kiuj mortis en la veneciaj pestoj, estis pekantoj, kaj ĉiuj postvivintoj nepekantoj. Do, temis pri kolektiva ke Dio aŭ alia sankta estaĵo intervenis grace por haltigi la amasmortigan fenomenon kaj tiel savis ilin – la postvivado estis same laŭŝanca. Ja estas homa naturo senti grandan bonŝancon en tia



Sunsubiro en Venecio post la tria novembra inundego
(Foto el video afiŝita de : www.huffingtonpost.it)

puno pro la pekoj de homaro, puno sendistinga, kaj tial ne eblis antaŭvidi, kiu estos frapita. Ĉiukaze, la postvivintoj de la pestoj sentis dankemon pro sia postvivado, eble des pli forte ĝuste ĉar ĝi estis laŭŝanca, kiel ĵeto de ĵetkubo. Eĉ se homoj ne kredis (aŭ se la eklezio ne kredigis), ke okazis dia puno, ili estis dankemaj, situacio, kaj surbaze de tio danki Dion (aŭ alian ĉielan estaĵon) se oni estas kredanto.

Ĝenerale, ŝajnas esti jene: oni dankas Dion (aŭ iun alian sanktan figuron) pro iu bonaĵo post malbonaĵo, ĉefe postvivado post iu serioza okazaĵo (ekz. natur-katastrofo, atako, incendio, akciden-

to) aŭ resaniĝo post serioza malsano, aŭ pro ŝanĝiĝo de malbona situacio, ekzemple, pluvo post periodo de sekego. Sed oni ne demandas kial Dio kaŭzis aŭ permesis la malbonaĵon, kial li permesis la morton de kelkaj aŭ multaj, sed lasis vivi aliajn, aŭ kial Dio permesis seriozan malsanon aŭ sekegon – aŭ eble oni kredas, ke estas dia puno aŭ iu alia nesciebla dia kialo. Klare, tiaj demandoj subfosas kredon je la ekzisto de Dio.

La kredemo pri eksternatura interveno en pli fruaj epokoj estas komprenebla. En la 17a jarcento kaj antaŭe, scienco ankoraŭ ne estis tiom progresinta kaj la epoko de klerismo ankoraŭ ne alvenis, tial religio estis forta. Homoj malmulte komprenis la kaŭzojn de pestoj kaj medicino estis ankoraŭ sufiĉe primitiva, kvankam oni malkovris, ke kvarantenoj povas malrapidigi ilian disvastiĝon (la vorto devenas de “quaranta”, “kvardek” en la itala, ĉar ĝuste en Venecio oni unue starigis 40-tagan izoligon). La vasteco de la epidemioj kaj la rezulta mortado estis tioma, ke homoj facile pensis, ke supernaturaj fortoj estis ligitaj kun ili, des pli se la eklezio tion asertis. Homoj kredis, ke preĝado povas helpi, kaj ke Dio aŭ sanktulo povas interveni – kaj ankoraŭ hodiaŭ multaj homoj tutmonde ĝuste tiel kredas, malgraŭ la progreso de scienca scio dum la lastaj tricent jaroj.

La venecianoj estis inteligenta kaj entreprenema popolo, kreis brilajn urbon kaj ŝtaton, kaj maran imperion. Ili estis bonegaj inĝenieroj, kiuj konstruis senkomparan urbon sur akvo kaj poste milojn da ŝipoj en la Arsenalo, la plej granda fabriko en Eŭropo. La urbo fariĝis centro de monda komerco. Sed, kiel multaj aliaj eŭropanoj, venecianoj vivis kadre de kristanaj kredoj kaj eklezia aŭtoritato. Manke de nia moderna scio, ili ne scipovis malebligi aŭ haltigi la pestojn, nur limigis ilin kvarantene, sed almenaŭ ilia religia dankemo post la teruraj spertoj naskis arkitekturajn valoraĵojn.

Venecio ĵus travivis plagon en la formo de trifoja inundado ene de kvin tagoj. La inundoj kaŭzis sufiĉe vastajn damaĝojn – al historiaj strukturoj, al butikoj, hoteloj, restoracioj. Mi supozas, ke malmultaj venecianoj kredas, ke la inundoj estis kaŭzitaj aŭ finitaj pere de dia aŭ sanktula interveno.

La plimulto de eŭropanoj hodiaŭ komprenas, ke ekzistas naturaj kaŭzoj por tiaj fenomenoj, kaj ankaŭ homefaritaj kaŭzoj, kiuj rezultigas klimat-ŝanĝiĝon kaj pli ekstremajn veter- kaj markondiĉojn. Tamen la 21an de novembro, kelkajn tagojn post la tria inundo, kiel ili faras ĉiujare, venecianoj festis la “Festa della Madonna della Salute”, irante per provizora ponto al la Salute-preĝejo, por kandele doni dankojn al la Madono, ĉu sincere, ĉu simbole, kaj preĝi por sano, kaj ekstere sur placo ĝui festajn manĝaĵojn kaj dolĉaĵojn. Ĝi estas bela, ĝoja trijarcenta tradicio.

Dank’ al Dio, aŭ pli precize dank’ al kredo je Dio, Venecio estas plenplena je belaj preĝejoj kaj belaj religi-inspiritaj artaĵoj. Sed, estas dubinde, ĉu Dio aŭ la Virgulino Maria povas savi Venecion kaj ĝiajn trezorojn de inundoj kaj plialtiĝantaj marniveloj – nur homoj povas fari tion per inteligenta intervenado. Estas ni homoj, kiuj devas agi por savi la valoregajn monumentojn ligitajn kun kredo je Dio, preĝado kaj dankemo al Dio!

**Nyegosh Dube (Pollando)**

## Hindo laŭte proklamas sian ateismon

En Hindujo povas foje esti danĝere tro laŭte anonci sian ateismon. Nur 33 mil hindoj deklaris sin ateistoj en la lasta popolnombrado; en lando kun 1,3 milardoj da civitanoj, tio estas nura guteto. Sed tio estas komprenebla, se oni memoras, ke en marto 2017 ateisma bloganto estis ĝismorte dishakita en suda Hindujo.

Kaj tamen troviĝas hinda junulo, kiu ne nur laŭte proklamas sian ateismon, sed portas surbrake du grandajn tatuojn kun la angla vorto Atheist. Li aldonis la vorton Atheist al sia nomo, kaj nun batalas por ricevi oficialan dokumenton kiel ateisto.

Tiu junulo nomiĝas Ravi Kumar Atheist. Li ne naskiĝis kiel ateisto, fakte liaj gepatroj estis piaj hinduoj, kiuj regule vizitadis templojn kaj partoprenis en ritoj dum religiaj festivaloj. Ravi Kumar ĉesis kredi, kiam li estis nur 6-7-jara. Iam kvar knaboj bategis lin,

kaj kvankam li preĝis por ricevi helpon de la sinjoro Kriŝno, tiu ne savis lin. Lia patro ĉiujare dum la Lampofesto aĉetis loteri-an bileton kaj preĝis al la diino Lakŝmio, kaj tamen li neniam gajnis.

Ravi Kumar nun estas 33-jara, kaj li ne vizitis templon de pres-kaŭ 20 jaroj. Li opinias, ke la monon elspezitan por konstrui templojn, moskeojn kaj aliajn religiajn institutojn oni prefere dediĉu al konstruado de lernejoj kaj malsanulejoj.



Fervora hinda ateisto Ravi Kumar Atheist
(Fonto: www.bbc.com)

En septembro 2017 li faris peton ĉe loka kortumo, laŭ kiu li rajtos oficiale aldoni la vorton Atheist kiel la lastan elementon de sia nomo. En januaro 2018 la juĝisto donis al li permeson uzi tiun nomon en siaj oficialaj doku-mentoj. Li ŝanĝis ĉiujn doku-mentojn, inkluzive de la nacia identeckarto kaj bankokartoj.

Poste li petis de la instancoj do-kumenton pri sia religia identeco (kiun multaj homoj havas en Hindujo). Laŭ ĝi, li estas "sen-kasta, senreligia kaj sendia". Li efektive ricevis tian dokumenton en aprilo 2019, subskribitan de loka oficisto. Aperis raportoj pri tio en la loka ga-zetaro, sed be-daŭrinde tio ti-migis la instan-cojn, kiuj petis lin redoni la do-kumenton. Laŭ ili, ili ne rajtas deklari, ĉu aŭ ne ekzistas dio, kaj ili deziras ansta-taŭigi la doku-menton per alia, laŭ kiu li estus "senkasta ateisto".

Ravi Kumar rifuzis redoni la do-kumenton, kaj apelaciis al panĝaba pli alta kortumo. En septembro lia apelacio estis rifu-zita. Laŭ la juĝisto, la hinda kon-stitucio donas al li la rajton esti ateisto, sed ne ekzistas jura be-zono posedi tian dokumenton.

Ravi Kumar nun intencas apelacii kontraŭ tiu decido, kaj faras peton pri tio ankaŭ al la hinda prezidanto. Li asertas, ke la registaro ja provizas civitanojn per dokumentoj rilataj al religio aŭ kasto, tial ankaŭ li kiel civitano rajtas ricevi dokumenton, kiu identigas lin kiel ateiston.

Pro sia agado dum la lastaj du jaroj, Ravi Kumar Atheist famiĝis. Li ricevas telefonvokojn de entuziasmuloj, kaj kelkaj informas lin, ke ankaŭ ili deziras preni Atheist kiel lastan nomon. Sed tio ankaŭ kaŭzis al li problemojn. Multaj homoj rifuzas paroli kun li, aŭ konsideras lin freneza. Li ne povas edziĝi, ĉar neniu familio pretas doni filinon al tia homo. Estis ankaŭ malfacile por li ricevi laborpostenon, kaj li vivtenas sin kiel domfarbisto.

Unue ankaŭ liaj gepatroj estis ŝokitaj, sed intertempe ankaŭ ili konvertiĝis al ateismo. Nun ili ne plu vizitas la templon, kaj ne plu faras religiajn ritojn hejme.

Ravi Kumar opinias, ke multaj el la problemoj en la mondo estas kaŭzataj de religioj. Li konstatas, ke politikistoj kaj religiaj gvidantoj uzas diferencojn de religio kaj kastoj por trompi la homojn kaj profiti de ilia kredemo. Li demandas: “Se Dio kreis la mondon, kial li kreis tiom da doloro kaj suferado?”

*Artikolo aperinta en la retejo de la BBC (“Ravi Kumar Atheist”), tradukita el la angla fare de la redakcio.*

## Pola junularo fariĝas malpli religiema

Pollando estas vaste konata kiel profunde religia katolika lando. Dum 27 jaroj, la tutmondan katolikan eklezion estris pola papo Johano Paŭlo II, kiun granda plimulto da poloj nomus la plej grava pola figuro en la historio. Preĝejoj ankoraŭ estas plenaj dum dimanĉaj mesoj. Milionoj aŭskultas ĉiutage katolikan radiostacion Radio Maryja. Kaj eĉ en ŝtataj institucioj kiel lernejoj, hospitaloj kaj poŝtoficejoj, oni vidas krucojn sur la muroj.  Tamen, estas indiko, ke Pollando iras en direkto de plua sekulariĝo. Laŭ la pola enket-organizaĵo CBOS (Centro por Esplorado de Socia Opinio –

la mallongigon oni prononcas "Ce-bos"), la nivelo de religiemo inter gejunuloj falas konstante ekde la jaro 2008.

**Kredanteco**

CBOS komencis esplori la religiemon de la junularo jam en 1996. En tiu jaro 81% da gejunuloj konsideris sin kredantoj. Dek du jarojn poste, tiu elcento restis senŝanĝa. Sed en 2013, nur kvin jarojn poste, la proporcio de kredantoj falis al 72%, kaj en la sekvantaj kvin jaroj, okazis eĉ pli granda malkresko ĝis 62% en 2018. (Mi aldonu, ke tiu elcento inkluzivas 7-8%, kiuj konsideras sin profundaj kredantoj, elcento kiu ĝis nun ne ŝanĝiĝis.) Samtempe, la proporcio de nekredantaj gejunuloj kreskis de nur 5% en 1996 al 10% kaj 13% en 2013 kaj 2016 respektive, poste al 17% en 2018.

Antaŭ ol daŭrigi, mi klarigu, ke la enketitoj estis plejparte 18- kaj 19-jaraj lernantoj en diversspecaj superaj mezlernejoj kiel liceoj, teknikaj lernejoj kaj metilernejoj.

**Religia praktiko**

La enketoj de CBOS ankaŭ ampleksis du aliajn indikilojn: religia praktiko (mesoj ktp.) kaj partoprenado en lecionoj pri religio. Se temas pri la unua, la artikolo, surbaze de kiu mi verkas tiun ĉi tekston, prezentas ne komparojn tempajn (mi ne scias, ĉu CBOS faris tion) , sed komparojn inter junuloj kaj la civitanaro ĝenerale. Dum 47% da poloj ĉeestas diservon unufoje semajne, nur 28% da junaj poloj faras tion. Kaj dum 16% ĉeestas unu- aŭ dufoje monate, same faras nur 11% da gejunuloj. Kaj dum nur 11% da poloj tute ne partoprenas en religiaj praktikoj, la cifero ĉe la junularo estas multe pli alta: 35%.

**Religia endoktriniĝo**

Se temas pri religiaj lecionoj, necesas unue klarigi, ke en Pollando estas devige por lernejanoj partopreni en lecionoj de religio en siaj lernejoj, aŭ alternative en lecionoj de etiko. Ĉi-rilate menciindas unue, ke la subjekto "religio" fakte signifas "katolika religio" – ne temas pri instruado pri la diversaj religioj de la mondo – kaj due, ke la instruistoj de la religio-klasoj lecionoj estas preskaŭ ĉiam katolikaj pastroj! Do, imagu: en ŝtataj lernejoj, ŝtate pagataj katolikaj pastroj provas endoktrinigi infanojn per la dogmoj de la katolika religio!

En la jaro 2010, 93% da gejunuloj ĉeestis tiajn religiajn lecionojn.

Tiu cifero iomete falis – al 89% – en 2013, sed ĝis 2016, la elcento jam falis al 75% kaj plue al 70% post nur du jaroj (supozeble, la aliaj ĉeestas etiko-lecionojn). Tamen, se oni rigardas la partopren-nivelojn en urboj kun pli ol 100 000 loĝantoj, oni konstatas multe malpli altajn ciferojn: 59% en urboj kun 100-500 000 loĝantoj, kaj nur 44% en urboj kun pli ol 500 000 loĝantoj.

**Konkludo**
Se tiaj tendencoj inter gejunuloj akompanos ilin kiel plenkreskulojn, ja eblas antaŭvidi sufiĉe grandskalan sekulariĝon de la pola socio. Eble Pollando fariĝos kiel Irlando: iam profunde katolika lando, kiu en la lastaj 30 jaroj trairis vastan sekulariĝon. Ankoraŭ en 1989, 88% da irlandanoj ĉeestis meson ĉiusemajne, dum en 2016 la cifero estis nur 35%. Kaj religiemo falis de 69% en 2005 ĝis 47% en 2012, dum en la sama periodo la proporcio de homoj, kiuj konsideras sin nereligiemaj, kreskis de 25% ĝis 44%. Oni povas supozi, ke ekde 2012 Irlando eĉ pli sekulariĝis.

Tamen, unu eventuale grava diferenco estas, ke en Pollando regas forte konservativa, naciisma, katolika partio (PiS), kiu ĵus retenis sian absolutan plimulton en la parlamento post elektoj ĉi-monate. Do, malgraŭ sekulariĝaj tendencoj, katolikismo havas eĉ pli fortan pozicion politike ol ĝi havis antaŭ 10 jaroj. Malfacilas, sekve, prognozi kiel aspektos Pollando post 10 jaroj se temas pri la pozicio de religio en ĝia socio.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

*Verkita surbaze de la artikolo "CBOS: polska młodzież jest coraz mniej religijna", kiu aperis en la pola novaĵ-portalo Onet, kun indiko, ke la fonto estas Katolicka Agencja Informacyjna (Katolika Inform-Agentejo) kaj surbaze de la angla-lingva Vikipedio.*

## Jehovanoj persekutataj: plua atako kontraŭ kredo-libereco en Rusio

En la numero de novembro 2016 (n-ro 23) de tiu ĉi bulteno, ni raportis pri la ŝtata persekutado de ateistoj en Rusio. La reĝimo de Vladimir Putin kunlaboras proksime kun la ortodoksa eklezio cele

al subpremado de kontraŭreligiemo. Sed tiu subpremado de libera kredo etendiĝas ankaŭ al religiaj grupoj, kiuj pro diversaj kialoj estas konsiderataj kiel minacoj al la rusa politika kaj socia ordo. En la lasta jardeko, verŝajne la plej persekutata religia grupo en Rusio estas la Atestantoj de Jehovo, kies historio komenciĝas en Usono en la 1870-aj jaroj.

En 2017 la Supera Kortumo de Rusio deklaris la jehovanojn ekstremisma organizaĵo kaj malpermesis ilian agadon, fermante ĉiujn el la 396 lokaj jehovanaj filioj en Rusio. Sed persekutado de la jehovanoj komenciĝis jam en 2009 en la ĉemara suda urbo Taganrog per aplikado de leĝo kontraŭ ekstremismo. Poste ankaŭ en aliaj urboj kaj regionoj la rusa ŝtato agis kontraŭ la grupo. Ekde 2009, okazas konfiskoj de presitaj materialoj, dominvadoj, arestoj, pridemandadoj, konfiskoj de propraĵoj, torturadoj, procesoj kaj enkarcerigoj de jehovanoj.

Lastatempe aperis raportoj en la retejoj de la *Moscow Times*, sendependa anglalingva novaĵretejo bazita en Moskvo, kaj de Human Rights Watch, konata homrajt-defenda organizaĵo, pri persekutaj agoj fare de rusaj instancoj kontraŭ la Atestantoj de Jehovo. En septembro 2019 ses jehovanoj en la ĉevolga urbo Saratovo estis procesitaj kaj kondamnitaj al 2 ĝis 3,5 jaroj de enkarceriĝo pro partoprenado en “ekstremisma organizaĵo”. En oktobro apud la nordsiberia urbo Norilsko, grupo da maskitaj policanoj invadis tendumejon, kie ĉirkaŭ 50 jehovanoj ariĝis por preĝi. Ili forprenis ĉiujn elektronikajn ilojn, kaj sekve portis la tendumantojn al ŝtata krim-enketejo en la urbo, kie ili estis pridemanditaj dum kelkaj horoj. Samtempe la polico invadis la hejmojn de kvin norilskaj jehovanoj. La Krasnojarska Enketa Komitato (Norilsko situas en regiono Krasnojarsko) malfermis krimkazon kontraŭ la jehovanoj. Kaj fru-novembre, kortumo en la sudsiberia urbo Tomsko kondamnis jehovanon al 6-jara mallibereco en punkolonio pro “organizado de malpermesata ekstremisma reto”. Same longan kondamnon ricevis dana jehovano loĝanta en Orjolo, en okcidenta Rusio.

Kial la rusa ŝtato persekutas la jehovanojn, nomas ilin ekstremistoj? Oni povas supozi



Jehovano Sergei Klimov dum proceso kontraŭ li en Tomsk, Rusio (Fonto: tv2.today)

kelkajn kialojn: 1) la Atestantoj de Jehovo havas sian sidejon en Usono; 2) kun 175 000 anoj en Rusio, kaj politiko de aktiva predikado kaj konvertado, la religio certe estas perceptata kiel minaco fare de la ortodoksa eklezio; 3) la jehovanoj rifuzas militservi kaj agnoski naciajn simbolojn kaj festotagojn – en Rusio, militservo estas deviga por viroj 18-27-jaraĝaj; 4) la jehovanismo havas rigidan strukturon, doktrinon kaj regularon, kiu regas la ĉiutagan vivon de siaj anoj, sekve jehovanoj vivas grandparte inter si ekster la ĉirkaŭa socio – tio certe malplaĉas al la rusaj instancoj.

Laŭ ateisma, humanisma vidpunkto, certe estas multo, kio estas antipatia pri la Atestantoj de Jehovo. Ili estas sekteca kun aŭtokrata strukturo, konsideras sekularan socion esti morale koruptita, influata de Satano, emfazas obeadon al Jehovo (t.e. Dio), kontraŭas aborto-rajton, kontraŭas eksgeedziĝon (krom en kazoj de seksa malfideleco), malakceptas sango-transfuzojn, konsideras la Biblion senerara kaj plene aŭtoritata (laŭ la interpreto de la estraro de la Atestantoj), kredas pri Armagedono kaj posta dia regno super la Tero (kiel multaj kristanaj konfesioj), havas diversajn aliajn strangajn kredojn, provas konstante varbi novajn anojn kaj eble cerbolavi la aniĝintojn.

Aliflanke, ekzistas ankaŭ kelkaj pozitivaj flankoj. La jehovanoj vidas sin kiel tutmondan frataron, kiu superas naciajn landlimojn kaj naciajn, etnajn kaj rasajn diferencojn – kaj estas vere kontraŭnaciismaj kaj kontraŭmilitaj. Tiurilate ili similas al ni Esperantistoj. Ankaŭ ilia teologio estas iom pli racia ol normala kristanismo: ili ne kredas pri la infero aŭ la senmorteco de la animo, kaj malakceptas la Triunuon. Ili eĉ ne akceptas la krucon kiel kristanan simbolon. Kaj malkiel kristanaj fundamentistoj, ili ne kredas, ke nur ili mem estos savitaj kiam okazos la Fina Juĝo. Kvankam ili havas hierarkian estrar-strukturon, ili ne havas pastraron; anstataŭe ili ariĝas regule por komune studi la Biblion kaj jehovanajn eldonaĵojn kiel la revuoj *Gardoturo* kaj *Vekiĝu!*.

Malgraŭ la negativaj trajtoj de jehovanismo, kiujn mi resumis ĉi tie, estas malĝuste kaj maljuste nomi la jehovanojn ekstremistoj, kiuj iel minacas la socion. La sola vere ĝena afero estas ilia malakcepto de sango-transfuzoj, kio povas konduki al morto – tio estas speciale ĝena, se temas pri infanoj, kies gepatroj pro sia jehovana kredo rifuzas savi iliajn vivojn per transfuzo. Sed malpermesado kaj persekutado ne solvos tiun problemon. Pli efike estus persvadado kaj edukado celitaj al eventualaj aliĝontoj kaj nunaj anoj. La jehovanoj ne uzas aŭ subtenas perforton, praktikas sian kredon pace.

Persekutado de la jehovanoj estas same kondamninda kiel persekutado de ateistoj en diversaj landoj. La libereco de kredo kaj ne-kredo estas grava principo, kiu devus esti respektata. En Rusio, la persekutado de la jehovanoj estas parto de pli vasta klopodo de la reĝimo subpremi grupojn, kredojn kaj ideojn, kiuj ne akordas kun la politika, socia kaj religia ordo, kiun ĝi celas konstrui kaj konservi, kunlabore kun la ortodoksa eklezio.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

*Verkita surbaze de la artikoloj "6 Jehovah's Witnesses Jailed for 'Extremism' in Russia" kaj "Russian Jehovah's Witness Hit with 6-Year 'Extremism' Sentence" el themoscowtimes.com, kaj "Persecution against Jehovah's Witnesses in Russia Escalates" el hrw.org. Kromaj fontoj: la anglalingva Vikipedio kaj la retejo de la Atestantoj de Jehovo, jw.org/en.*

## Usonanoj fariĝas malpli kristanaj: senreligiuloj jam nombras 25%

*La kvanto da kristanoj malpliiĝis je 12% dum la lastaj 10 jaroj. Laŭ enketo, malpli ol duono de junuloj naskiĝintaj post la jaro 2000 estas kristanoj.*

Laŭ novaj datumoj, Usono fariĝas malpli kristana lando, kaj pli rapidas la senreligiiĝo inter junuloj. Proporcie plenkreskuloj kiuj sin konsideras kristanaj malkreskis je triono: entute 12-procenta malpliiĝo, ene de la lastaj dek jaroj, laŭ datumoj de la Esplora Centro Pew. [1] Dum la sama periodo, la nombro de tiuj, kiuj sin priskribas kiel ateistojn, agnostikulojn aŭ "nenion specifan" kreskis je 17%, kaj nun ili konsistigas pli ol kvaronon de la plenkreskularo.

Eklezioj kaj fid-movadoj daŭre influadas kaj la administracion de Trump kaj ŝtatajn registarojn, sed samtempe malpli da homoj ol antaŭe partoprenas en preĝoservoj. La religiaj grupoj, kiuj plej multe strebas ŝanĝi siafavore la registaron, estas la t.n. "born again" (renaskiĝintoj) kaj la evangeliaj protestantoj. Ili konsistas plejparte el blankuloj. Ĉi tiuj grupoj nun konsistigas nur 16% de la plenkreskularo; antaŭ dek jaroj, tiu proporcio estis 19%.

Laŭ la raporto de Pew, kiu publikiĝis mez-oktobre, kristanaj komunumoj perdas membrojn pli kaj pli rapide. La kvanto de tiuj, kiuj partoprenas en preĝoservoj unu- aŭ du-foje monate, malkreskis je 7% ekde antaŭ dek jaroj. Nun estas pli da usonanoj, kiuj vizitadas preĝejon maksimume kelkfoje jare, ol tiuj, kiuj vizitadas minimume ĉiumonate. Tiuj malkreskoj suferigis kaj katolikajn kaj protestantajn eklezioj. Laŭ Pew, 43% da plenkreskuloj priskribas sin kiel protestantojn; en 2009, tiu kvanto estis 51%. Katolikoj kvantas 20% kompare kun 23% en 2009.

Malpli ol duono de gejunuloj (naskiĝintaj post la jaro 2000, t.n. 'jarmiluloj') priskribas sin kiel kristanojn; 40% da ili senreligias, kaj 9% sekvas nekristanajn religiojn. 22% da junuloj neniam vizitas preĝejon por diservoj, dum sama kvanto ja vizitas, almenaŭ unu fojon ĉiusemajne.

Se temas pri la 'nespecifuloj':

- La kvanto da religiaj 'nespecifuloj' kreskis en ĉiu popola kategorio: blankuloj, nigruloj, kaj latinuloj (t.e. hispanlingvaj amerikanoj loĝantaj en Usono); viroj kaj virinoj; en ĉiu regiono de la lando; kaj senkonsidere de niveloj de edukiteco.

- Pli da religiaj 'nespecifuloj' estas demokratoj ol respublikanoj, sed ili ja plinombriĝas en ambaŭ politikaj partioj; kaj plej rapide ili plinombriĝas inter adoleskantoj, kvankam ankaŭ estas kresko inter gejunuloj kaj pli maljunaj plenkreskuloj.

Nekristanoj ne malkreskis, fakte ili plinombriĝis, el 5% (2009) ĝis 7% (ĉi-jare). En Usono, 2% estas judoj, 1% islamanoj, 1% hinduoj, 1% budhanoj, kaj 3% membras en aliaj religioj, ĉu komunumaj ĉu personaj, inkluzive tiujn kiuj sin konsideras 'spiritemuloj'. *[Red.: la sumo de la unuopaj procentoj estas 8%, ne 7%, sed tiel aperas la ciferoj en la originala artikolo]*

Pew kolektis siajn datumojn per telefon-vokaj enketoj dum la lastaj du jaroj.

[1] https://www.pewforum.org/2019/10/17/in-u-s-decline-of-christianity-continues-at-rapid-pace/

*Artikolo de Harriet Sherwood, aperinta en la retejo de la brita ĵurnalo* The Guardian *kun la titolo "Americans becoming less Christian as over a quarter follow no religion". Tradukita por la bulteno fare de Manuel Giorgini (Italujo).*

# Ateismo

## Organo de ATEO

## Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo


**Vorto de la Redaktoro** 2

**Ateisma Vivo**

Festado por ateistoj: enkonduko al la temo 3

Dimanĉaj asembleoj 5

"Maldiservo" – ĉu taŭga ideo por liberpensuloj? 8

Laikaj festoj iniciatitaj de Rabindranath Tagore 9

Ni ĵetu la Kriston el Kristnasko! 12

Adiaŭi karulon: persona sperto de laika funebrado 14

**Filozofiaj kaj Historiaj Perspektivoj**

Ĉu ordo en la universo kondukas al Dio? 16

Fido kaj dankemo fronte al amasaj malfeliĉaĵoj 18

**Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj**

Hindo laŭte proklamas sian ateismon 22

Pola junularo fariĝas malpli religiema 24

Jehovanoj persekutataj: plua atako kontraŭ kredo-libereco en Rusio 26

Usonanoj fariĝas malpli kristanaj: senreligiuloj jam nombras 25% 30



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:

**ateismo.bulteno@gmail.com**

Por informo:

**anna.lowenstein@esperanto.org**

Prezidanto (vakas)

Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio

Sekretario: Anna Lowenstein, Britio

Kasisto: Dieter Rooke, Svislando

Enpaĝigo: Jakvo Schram, Belgio

Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando

Jarkotizo: 10€ por A-landoj

8€ por B-landoj

Konto: **ateo-y** ĉe UEA